

Manfred Hausmann,  
La akvofalo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Blinde sin ĵetas purpur' akvofala  
en la abismon tie ĉi.  
Kaj disiĝas la ruĝo kaj pala  
akvofumo eliĝas el ĝi.

De l' altej' nebulvualo  
subeniĝas tie ĉi,  
ĝi ruliĝas tra la valo,  
de la arboj gutas ĝi.

Glime sur la ŝaŭm' ŝvebanta  
estas arko el odor'  
kaj la akvo estas bruanta  
kvazaŭ tondro en la for'.

El la verdo de l' arbaro  
rokoj supren levas sin.  
La prafort' de l' vivantaro  
bolas jen en la ravin'.

*Traduko de la Germana poemo "Der Wasserfall" de MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2013-12.*

*Arg-945-1901 (2014-03-19 15:12:32)*

Manfred Hausmann,  
La akvofalo

*tradukita de Chiu Ling Chang*

De alto de dek-mil futoj,  
kvazaŭ de la ĉielo  
la kaskado fluge ĵetas sin suben,  
kaj ĉirkaŭ ĝi prezentiĝas  
nimbo jen ruĝa jen purpura.  
Ĝi, ŝajnante esti ĉielarko sub la suno,  
rekte falas inter arboj kaj tra la nebulo;  
en la serena vetero aŭdeblas  
bruo de vento kaj pluvo.  
Kiel majestas la monto Lushan!  
La nebulo kaj la akvo harmonie  
kunfandiĝas en fean iluminacion.

*Traduko de la Germana poemo "Der Wasserfall" de MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 – †1986-08-06) en ĉina de CHIU LING CHANG (\*673 – †740).*

*Arg-945-1989 (2014-04-01 18:00:10)*